

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks  
Zeventiende jaargang  
Nummer 10 (196)  
OCTOBER 1950

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P.M. Mäbesoone  
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 75 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 60 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## DOKUMENTA SERVO Kio okazis en 1949?

### GREKUJO

Pri la movado en Grekujo oni malofte legas ion. Sed la fakto, ke oni povis eldoni dumonatan gazeton *Helena Esperantisto*, atestas, ke ankaŭ tie troviĝas aktivuloj. La ministro de kulturo kaj klerigo en 1949 denove atentigis pri la dezirindeco faciligi la instruadon de Esperanto en mezgradaj kaj samspecaj lernejoj, klarigi la signifon de Esperanto por la alproksimiĝo de la popoloj kaj rekomendi abonon je la gazeto *Helena Esperantisto*.

### HISPANUJO

En Hispanujo la landa asocio Hispana Esperanto-Federacio regule aperigas sian organon *Boletín*. Pluaj informoj mankas.

### ISLANDO

La Federacio de Islandaj Esperantistoj kuraĝe eldonis dum 1949 kvaronjaran grandformatan ilustritan gazeton *Voĉo de Islando*, por diskonigi la islandajn vivon kaj popolon. Espereble la subteno de allandanoj ebligas la pluaperadon. Sondo de la opinio de la islanda popolo koncerne Esperanton montris, ke 72,5% favoras nian lingvon, 17,1% kontraŭas ĝin kaj 10,4% estas indiferenta pri ĝi.

### JAPANUJO

En Japanujo la movado progresas malgraŭ malfavora ekonomia situacio. La 36-an kongreson de japanaj esperantistoj ĉeestis proks. 130 personoj. Pluraj fakkunsidoj. Propaganda parolado de Goro Hani, parlamentano kaj fama verkisto. En sciencaj rondoj multe da interesiĝo. T. Kirisu publikigis du verkojn *Voĉo de V mondo* kaj *La sama suno brius super la tuta mondo*, en kiuj aperis leteroj el eksterlando en japana traduko.

## ESPERANTO en ONDERWIJS

*Wij vernemen uit betrouwbare bron, dat op het Ministerie van Onderwijs, Kunsten en Wetenschappen (Nederland) wordt gewerkt aan een wetswijziging, die facultatief onderwijs van Esperanto aan de lagere scholen mogelijk maakt.*

### NORVEGUJO

Norvega Esperantista Ligo bonvolis sendi raporton pri 1948 el kiu ni ĉerpas, ke la membronombro estis 532. Raporto pri 1949 ankoraŭ ne alvenis.

### POLUJO

*Pola Esperantisto* aperas ciklostilita. Ni ricevis unu numeron preskaŭ tute pollingvan, do ne povas raportii.

### SVEDUJO

Sveda Esperanto-Federacio aranĝis en la kadro de sia aŭtuna propagando prelegvojaĝon de la egipta samideano Tadors Megalli. Okazis pli ol 200 prelegoj. Entute pli ol 20.000 personoj aŭdis la paroladojn. Oni vendis 2000 lernolibrojn kaj 5000 ŝlosilojn. Pli ol 800 svedaj gazetoj publikigis artikolojn. Oni aperigis por disdonado du broŝuretojn je la nombro de po 25.000 ekz. La sveda registaro donis al la Sveda Esperanto-Instituto subvencio de 1800 kr. por sendi delegiton al la kongreso en Bournemouth. Aperis ĉiunomate *Svenska Esperanto-Tidningen*, eble la plej ampleksa kaj plej bonaspekta nacia Esp. organo.

### SVISUJO

La Svisa Esperanto-Societo malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj (Ido kaj Occidentalmovadoj havas tie sian centron) laŭpove agadis. *Svisa Espero*, ciklostilita kun presita kovrilo, aperis 8 foje en la jaro.

### URUGVAJO

En Urugvajo serioza revuo *Anales de Instruccion Primaria* enpresigis multpaĝan artikolon pri Esperanto. Ĝi estis eldonata kiel aparta broŝuro 40-paĝa sub la titolo *Valor Educativo del Esperanto*. La 5-a kunveno de la Urugvaja Instruista Federacio akceptis rezolucion favoran al Esperanto, en kiu oni akcentis la edukan valoron de nia lingvo kaj ĝian signifon por la interkomprenado kaj unuigo de la popoloj. (finota)

G. P. De Bruin

## Kritikaj impresoj pri la Pariza Universala Kongreso

*Kiu deziris scii detalan raporton pri la diversaj okazajoj de tiu granda Esperantista Manifestacio, nu, tiu legis « Esperanto(n) » aŭ « Heroldo(n) »...*

*Ci tie vi do trovos nur kelkajn nekompletajn juĝojn kaj impresojn, kompilitajn laŭ la notoj de Sro H. Bakker kaj speciale de Drs F. Roose.*

*La de la unua gvidata aŭtobuskaravano nederlanda (45 partoprenantoj) startis vespere la 4-an de aŭg. kaj pasigis la nokton en Breda; poste oni veturis al Brusel, vizitis la urbon kaj atingis Parizon je la 7-a, tiel ke la partoprenantoj ĝustatempe povis ĉeesti la interkonatiĝan vesperon. Krom la « aŭtobusantoj », 19 nederlandanoj vagonare rapidis al Parizo, sub la gvidado de S-ino M. Bakker. Bona humoro ĉe ĉiuj, kvankam la akcepto en la pariza stacidomo ne estis bone organizita.*

*La flandroj, sufiĉe multnombro, sed ĝenerale ne kune, kaj per diversaj rimedoj, aliris la saman celon. La vojoj, kiuj el la Nordo kondukas al Parizo, ne ĉie bonstatas, sed ili plibonigas kiam oni proksimiĝas al la franca ĉef-urbo. Fine oni enveturas la lokon de nia ĉiujara amasrendevuo. Sed oni ne rimarkas tion. Oni ne vidas esperantistojn. Parizo estas tro granda. Nia kongreso glutigas, dronas en la milion-logantaro. Nur ĉirkaŭ « Sorbonne » oni povas konstati pri la Kongreso. Kaj tie oni notas ke efektive eĉ pli da gesamideanoj kunvenis ol en la antaŭaj kongresoj. Kia kontrasto! En Malmö ekz. nia kongresanaro vere inundis la urbon. Preskaŭ en ĉiu strato oni vidis la verdan stelon, ankaŭ en tramoj kaj aŭtobusoj. En Parizo, el la ĉirkaŭaĵo de « Sorbonne » oni troviĝas en la ordinara, ĉiutaga Parizo!*

*Kiam kongreso okazas en malpli grandaj urboj, ili mem estas kvazaŭ nia Esperantujo! Ĉi tie nur la kongresejo estas nia patrolando. Sed kiel ĉarma ĝi estas! Poŝtoficejo, rendevua kaj koresponda tabuloj, librostando, fotostando, eĉ*



La sveda ĥordancgrupo dancis, ne nur en Parizo, sed ankaŭ sur la granda Placo en Bruselo...

*oficejo kie eblas aliĝi al la venonta kongreso; ĉiuj en- kaj elirado de gesamideanoj. Kaj ade kunvenoj en la diversaj salonoj, por ĉies deziro. Ankaŭ la komunaj manĝejoj havas saman ĉarmon de svarmanta amaso da Esperantistoj; multaj naciaj kostumoj kompreneble pligrandigas tiun ĉarmon.*

*La kongreso devis okazi sub la signo de la digneco. Tion volis la organizintoj. Tute prave. Ili zorgis pri akceptoj ĉe vere indaj instancoj: Unesco. Parizaj urbodomo kaj komerca ĉambro, Galerios Lafayette ktp. Mi ne scias kiun impreson lasis la akcepto en Unesco de ĉe S-ro Godshot. Tiu brave s-ro Godshot ade plu disvolvis longegan klarigon pri la diversaj laboroj de la komplika Unesco-organizo. Malgraŭ premega varmo. Do, neeviteble, kelkaj endormiĝis... kaj multaj foriris.*

*Ni gratulu pro la laboremo de la komitatanoj, kiuj kunvenis pli ol 21 horojn. La partopreno tamen estis nekontentiga, verŝajne ĉar oni tro postulas de la komitatanoj, kiuj ja ankaŭ ŝatas kongresi. Ĉu solvo ne trovebla?*

*La sportdemonstracioj nuntempe logas la grandajn amasojn. Ankaŭ la kongreskomitato unufoje okazigis sport-posttagmezon. Mi estis ege svicolema... aŭvide informiĝis pri horo, loko kaj specoj de konkursoj: sed, malfeliĉe, neniu — eĉ ne kelkaj konkreskomitatanoj, sciis ion pri la programero!*

*La balo okazis en plej luksaj salonoj. Multaj belaj vestaĵoj. La sveda ĥordancgrupo bonege dancis. Sed la balo mem ne estis gvidata kaj do estis ne tre amuza. Necesus sendube pli da variece!*

*Granda intereso por la oratora konkurso! Mi vere ne sciis ke tiom da gesamideanoj ankoraŭ ŝatas paroladon. Ĉu la stimulo konkursa? Tamen, malmultaj partoprenantoj kaj kia kvalito! La unua premiito, franco el Reims, estis bonega esperantisto, li bone paroladis... Sed kia malriĉeco je ideoj! La tria premiito, mi nur diru ke li estas oratora kompatindulo: oni apenaŭ aŭdis lin, li parolis tre...angle, hezite kaj balbute. Kion do fari por ne esti premiita? Ni esperu ke en Konstanz inter la ĝejnuloj estis kelkaj oratoraj talentoj, kiuj scias-kaj havas ion por diri al esperantistoj!*

*Kaj la amuzaj aranĝoj. Jen tikla afero. Precipe kiam oni legis artikolojn tiel senrezerve laŭdajn, kiel en la septembra numero de « Esperanto ». La varieca vespero estis bona, la « Sonorilo de la Paco » estis admirindaj, la ĥordancgrupo el Svedujo ankaŭ tre bona, la teatraĵo denove bonega, ktp. Kion diri pri la eksterkongresa revuovespero de R. Schwartz? Li mem estas eksterordinare brila kaj sprita « causeur », sed same en liaj paroloj kiel en liaj libroj troviĝas, laŭ mi, dirajoj iom tro sale kaj grase « francaj » (ĉu francaj?). La kabareto mem estis dividita en du partoj: ĉiuj teatraĵoj estis en la dua: kial ne miksi kun la cetero? Ĝenerale la programeroj impresis senvaloraj; mi tamen substreku ke la teatraĵoj skizoj estis ĝinaj kaj nepre bonaj. Mi admiris nur la senkomparan virtuozecon de Undine von Midwey kaj la deklamadon de blinda samideano, kiam li parolis pri sia riĉega, humplena interna vivo. Ankaŭ Waringhien estis tre sprita, sed ĉu oni bone komprenis lin (kaj multajn aliajn)? La unua parto estis nepre malkontentiga, kaj ne nur mi tiel opiniis! Iu demandata samideano respondis al mi: « Ni ne estu tro postulemaj! » Nu, kial ne, la kongreso neniel estas senpaga por ni! Sed kial oni ne kumigis la variecan vesperon kaj la kabaretan por formi unu belan tuton? Ĉar la partoprenantoj de universala kongreso sendube meritas tion, ĉion bonan kaj taŭge aranĝitan! Ĉu ne pensi pri tiuj multaj kiuj senpage laboradas, multe elspezas el propra poŝo...kaj kiuj fine eĉ ne kapablas iri al Universala Kongreso?*

*La nederlanda aŭtobuskaravano, tuj post la oficiala fermo, forlasis Parizon. Ĉe la landlimo, kontrabandata botelo da konjako rezultigis ke la doganistoj esploris ĉiujn kofrojn!*

## Wereldnieuws

Behoudens goedkeuring van het Gemeentebestuur zal Esperanto dit jaar voor het eerst officieel worden gedoceerd aan de Gem. Universiteit te Amsterdam. Het openingscollege is voorlopig vastgesteld op 4 October, 12 uur. Docent de heer S. Pragano.

De redactie van Dansk Esperanto Blad schat de uitgaven van de Deense regering ten behoeve van de Esperantobeweging van Juli 1948 tot Juli 1950 op 60.000 kr. De Esperanto-vereniging in Ljubljana (Joego-Slavië) ontving een subsidie van 100.000 dinar (bijna \$ 2000) van de Sloveense Vakbeweging. Ook de verenigingen in Ptuj en Varazdin kregen subsidies.

In München, waar in 1951 het 36-ste Esperanto-Wereldcongres plaats zal vinden, is een internationale logarithmentafel met tekst en aanwijzingen in het Esperanto uitgegeven. In Finland verscheen « De talensleutel van de conducteur », een uitgave van de Finse Spoorwegen, waarin de conducteur in 7 talen, w.o. Esperanto, de meest voorkomende zinnen vindt, die bij het spoorwegverkeer worden gebezigd.

Het nationale Esperanto-congres dat met Pinksteren in Brno (Tjecho-Slowakije) werd gehouden, is door meer dan 1000 deelnemers bijgewoond.

In Caracas (Venezuela) en in Indonesië werden Esperanto-bonden opgericht. Secretaris van de Indonesische Esperanto-bond is D. J. Ampasiek, B.2, Djakarta.

« Scandinavian Airlines System » heeft opnieuw een voublad in Esperanto uitgegeven. De stad Almelo heeft een geïllustreerde gids uitgegeven in 4 talen, w.o. Esperanto en Deens. Een Deens blad schreef hierover, dat de Esperantotekst goed, maar de Deense zeer slecht is.

In Reykjavik wordt een speciale Esperanto-cursus voor onderwijzers gegeven. De Coöperatieve Federatie van IJsland heeft Esperanto opgenomen in het leerplan van haar Correspondentieschool.

Ter gelegenheid van het jaarlijkse congres van de Zweedse Esperanto-Federatie gaf de burgemeester van Norrköping als zijn wens te kennen, dat Esperanto de taal van de Veren. Naties zou worden. In dat geval, zo meende hij, zou Zweden heel wat minder bij te dragen hebben in de kosten van de Veren. Naties.

### Rememoro pri la dudeka:

*En la kongreso numero de « Esperanto », s-ro Georges Agricola faras rimarkon pri tio, kio povas solenigi kongresan malferman kunsidon, ekz. la solena eniro. « Iam », li skribas, « mi ne plu scias je kiu kongreso, estis muziko, trumpetsignalo aŭ io simila, kiu signis la eniron de la kongresa estraro kaj de la oficialuloj. Ni ne tro malalte taksu tiajn detalojn. »*

*Rilate tiun rimarkon mi memoras, ke dum la dudeka kongreso (1928) la Antverpenanoj prezentis ĵenan specialaĵon: la tradiciaj urbaj tamburistoj, en malnova flandra kostumo, anoncis per solena tamburado la eniron de la estraro sur la scenejon kaj ankaŭ la finon de ĉio, eĉ plej malgranda parolado. Estis ankaŭ en la salono granda orgeno sur kiu la Espero kaj la nacia kanto estis ludataj.*

FLANDRAJ POETOJ EN TRADUKO

**DU ĈEVALOJ**  
(TWEË HORSEN)  
GUIDO GEZELLE

*Tintilsonigante tonpure  
paŝadas ĉevaloj en par' ;  
ŝarĝtrenas ŝvitante polure,  
ke brilas la blonda harar'.*

*Ili paŝas, pen-tiras la ŝnurojn ;  
rondpremas sur korpojn jungil'  
striktstreĉa sur streĉajn femurojn :  
ilin movas ĉarist' per guidil'.*

*Senhalte l'ĉevalo kun ĉaro  
daŭriras, kvietaj dum frap',  
tirskuo, ekpuŝo kaj knaro,  
en ĝena bruado de l'nab'.*

*Viplin' ne necesas ne nure  
sed ŝnur' eĉ ne tuŝas al har' :  
tintilsonigante tonpure  
tiel paŝas ĉevaloj en par'.*

trad. H. Vermuyten

NEDERLANDAJ POETOJ EN  
TRADUKO

**KNABO BLOVIS**  
(EEN JONGEN BLIES)  
JULES SCHÜRMAN

*Sur ŝalmo blovis knab'. Kantel'  
Gajigis hele en kvietl'.  
Kantel' petola.*

*Mi sekvis lin kaj kun plezur'  
Aŭskultis puran ludon nur,  
Petolan kanton.*

*Nun ĉiam vivas en la kor'  
La melodio longe for,  
Petola kanto.*

*Sed ĉu variis senc' de ĝi ?  
Sin trovas nun melankoli'  
En kant' petola.*

trad. H. Vermuyten

**Plaatselijk Nieuws**

V.E.B. — *Afdeling Brugge* : Sedert een paar weken beschikken wij over een nieuw lokaal. Onze Voorzitter hield er reeds een lezing over *Historie de la Kalendaro*. In 't verschieft tot einde October : 1. een «informa kunveno» met H. Adv. Van Gindertaelen en Drs. Roose als sprekers ; 2. Aanvang van een Esp. wintercursus ; 3. Inrichting van een dansfeestje. Buitendien lopen de wekelijkse vergaderingen, met vast agenda, normaal door.

V.E.B. — *Afdeling Mechelen* : In September vingen onze regelmatige vergaderingen weer aan. Dienen vermeld : Een lezing gehouden door Mej. Van de Werf en dhr. Vercaemmen over hun indrukken in verband met het Wereldcongres te Parijs en hun verblijf in de Lichtstad ; voordragen van dhr. Van Gindertaelen van fragmenten uit een vertaling : *La Silento de la Muro* van Vercors. Verder grammatica en lectuur. De Esperanto-leergang, ingericht in het kader van de Stedelijke Avondcursussen, vindt ook dit jaar plaats, te beginnen met 3 October e.k. en dit *iedere Woensdag en Vrijdag van 18.30 tot 20 uur*. Belangstellenden gelieve zich kosteloos in te schrijven in de Stedelijke Lagere Jongensschool, Louisastr. 3 (Vrijdag, 29 Sept. van 18.30 tot 20 uur en op de dag der heropening).

**ANONCETOJ**

*Ĉiu vorto aŭ mallongigo : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume: g. 1.— aŭ bfr. 15.—*

Anglo petos korespondanton por interŝangi ideojn pri libroj kaj botaniko : Ernest Dutcheĉ, Lausel House, St. Peters Road, 11 Broadstairs (Kent), Anglujo.

Mi deziras interŝangi poŝtmarkojn, Jaroslav Petrácĉek — Usti n/Lab-Srĉekov ĉeĉinska 771/6. Ĉeĉoslovakujo.

Bulgara oficisto, 18-jara, ŝatus korespondi pri filatelo kaj aliaj temoj : Dolri Georgiĉe — str. Car Boris, 57 Burgas-Bulgarujo.

Deziras korespondi pri la paco-problemo : Hans Lesche, Radebeul 2/Sachs. (10 a) Käthe-Kollwitz-str. 25, Germanujo.

Deziras kontakton kun grupoj de sindikatoj, celante korespondadon pri mond-paco, Friedenskomitee der Stadtsparkasse Dresden, Güntzplatz, 5, Dresden-A 16, (10 a) Germanujo.

Fino Maria de Jesus Tavarez, Estrada do Ferte 61, Cordeiro Recife Pernambuco, Brazilo, deziras korespondi kun nederlandan(in)o.

**LA STUDANTO**

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer :

Dormantoj kelkfoje ronkas ; dormemaj personoj ofte oĉsedas ; publiko montranta sian aprobon aplaudas, sed se ĝi estas malkontenta, ĝi fajfas ; koleraj personoj ofte grinĉas per la dentoj ; facila venteto susuras inter la arboj ; pro subita ekscito de la nazaj nervoj oni ternas ; malvarmumintaj personoj ofte tusas ; la akvo plaŭdas sub la remiloj ; per vipo oni povas klaki ; ploranta persono ofte singultas ; kanonoj tondras.

1. Ankoraŭ neniam mi havis tiom da plezuro kiel la lastan vintron.

2. Kvankam estis tre malvarme, mi tamen ĉiun tagon iris glitkuri ; mi havis paron da bonaj glitiloj.

3. Mi ne volas diri, ke mi estas stelo sur tiu kampo, sed mi tre bone povas amuziĝi sur la glacio.

4. En landoj kie neniam frostas, la infanoj ne povas imagi (niet : *imagi sin of al si*), ke en Nederlando, Danujo, Svedujo k.t.p. oni povas marŝi sur la akvo.

5. Tamen ĉiuforte kiam la vintro estas pasinta kaj la printempo venas por ornami la landon, mi estas tre ĝoja.

6. Tiam ni iras al la regionoj, kie la florbuloj montras siajn plej belajn florojn.

7. Tie ni admiras la flavajn narcisojn ; la ruĝajn, flavajn kaj blankajn kruksojn, tulipojn kaj hiacintojn.

8. Sed milionaj da florbuloj ankaŭ iras eksterlanden kaj tiu komerco alportas al nia nuntempe tre malriĉa Nederlando multajn devizojn.

Vertaal :

1. In ons lans verandert het weer vaak ; nu eens regent het, dan weer schijnt de zon.

2. Na een half uur gewacht te hebben, ging ik heen.

3. Als ik zo ziek was, raadpleegde ik een dokter.

4. Wie er ook komt, ik kan vandaag niemand ontvangen.

5. Ik zou juist uitgaan, toen er gebeld werd.

6. Die jongen is veel sterker dan zijn broer ; hij is bijna even sterk als zijn vader.

7. De kinderen baadden in de rivier.

8. Zorg, dat U uiterlijk om zes uur opstaat, opdat U op tijd aan et station bent.

Tracht de volgende uitdrukkingen te vertalen :

Zich hees schreeuwen ; de oren spitzen ; voor dag en daw ; licht geraakt zijn ; daar gaat niets boven ; dat is een uitgemaakte zaak ; daar staat m'n verstand bij stil ; dat heb ik wel zien aankomen ; hij keerde onverrichter zake terug ; ik dank je stichtelijk ! ; iemands raad in de wind slaan ; zich uitsloven ; tot overmaat van ramp ; hij komt me om de andere dag bezoeken ; hij sliep z'n roes uit ; iemand uitmaken voor verrader ; ieder vogeltje zingt zoals het gebekt is ; zonder aanzien des persoons ; iets op de pof kopen ; kort van memorie zijn.

*Komunikoj de niaj libro-servoj.*

<i>Interlingvistiko kaj Esperantologio de Dro Manders</i>	30,—	2,25
<i>Vijf Kunstalen de Dro Manders</i>	100,—	7,50
<i>Londonanidoj (verko de 14-jara angla knabo)</i>	26,—	1,50
<i>Ĉe Sanktaj akvoj (kun belegaj fotografajoj ; I kaj II kune)</i>	66,—	6,—
<i>A.B.C. libro</i>	—	0,75
<i>Forto de l' Vero</i>	22,50	1,75
<i>Sep fratoj</i>	125,—	9,—
<i>Aelita (romano, bindita)</i>	—	3,25
<i>Granda portreto de Dro Zamenhof</i>	15,—	1,25
<i>Silka portreto de Dro Zamenhof (belega, paĝa signilo)</i>	10,—	0,75
<i>Morto de trajno</i>	63,—	5,30
<i>Esperanto-marŝo por piano</i>	—	1,—
<i>« Sub la verda standardo », por piano</i>	—	1,—
<i>Nova Testamento</i>	25,—	1,25
<i>Georgo Dandin</i>	—	1,10
<i>Originala verkaro</i>	152,—	11,25
<i>Infanoj en Toronto I kaj II kune</i>	55,—	—
<i>id. vol. II</i>	—	2,—
<i>Brulanta sekreto</i>	25,—	2,35
<i>a) Ni havas ankoraŭ malgrandan kvanton da poŝtkartoj pri la Zamenhofa monumento en Bergen op Zoom : Po 10 centoj.</i>		
<i>Tiu ĉi monumento simbologas la tutan Esperanton ideon kaj la vivoncepton de Dro Zamenhof. Se oni aĉetas 10 ekz. oni senpage ricevos la tutan simblolan signifon surpapere ;</i>		
<i>b) Ni havas ankoraŭ ilustritajn poŝtkartojn, kun Esperanto-teksto, pri Brussel, Antwerpen kaj Kortrijk. Po libreto de 10 p.k. nur 4,— Belg. fr.</i>		
<i>Mendu ĉe Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenbergsesteenweg, 72, Brugge. Boekendienst LEEN, Z.O. Singen, 5, Bergen op Zoom (giro 76915).</i>		

9. En aliaj provincoj estas la fruktarboj, kiuj altiras la turistojn, kion niaj hotelistoj kaj butikistoj volonte vidas.

10. Mi demandas al vi : « Kial kelkaj homoj volas pasigi sian libertempon ĉiam en aliaj landoj, dum ke nia propra lando ofertas multajn vidindajn lokojn ?

Vortscio — Respondoj :  
Spado : b. Referenco : a. Enfilo ; c. Selakto ; c. Kaporo ; b.

Enkele beginners verzochten om gemakkelijke oefenstof. Natuurlijk voldoen we graag aan hun verzoek en hier volgt dan om te beginnen een eenvoudige opgave :

Malsana— kamparano— komprenis, ke li— havas nur mallonga— tempo— por vivi. Li— diris al siaj— du filoj— : « En la kampo— malantaŭ la farmbieno— troviĝas granda— trezoro—. Post mia— morto— vi devas serĉi ĝi.— »

Kelkaj— tagoj— post kiam la patro— mortis, la filoj— komencis serĉi la trezoro—. Ili— laboregis, sed trovis nenio—. La filoj— fosis profunde en la tuta— kampo— kaj turnis de la tero— la supro— malsupre—, sed ne trovis la trezoro—.

Kiam venis la printempo—, ambaŭ fratoj— semis tritikon— en la kampo—. La greno— kreskis bonege. Neniam ili— vidis tia— belega— tritikokampo—.

Nun la filoj— komprenis, kio— la patro— volis diri.

Vervang daar, waar het nodig is de streepjes door de letter n.

Vertaal bovenstaande anecdote in goed Nederlands en beantwoord daarna de volgende vragen met volledige zinnen :

1. Kion komprenis la malsana kamparano ?
2. Kiujn li venigis al sia lito ?
3. Kion li diris al siaj filoj ?
4. Kiam ili serĉis la trezoron ?
5. Kiamaniere ili serĉis ?
6. Ĉu ili diligente fosis ?
7. Kion ili faris en la printempo ?
8. Nomu kelkajn grenspecojn.
9. Ĉu la greno bone kreskis ?
10. Ĉu la filoj tiam komprenis, kion la patro volis diri ?

Vertel nu de hele anecdote met eigen woorden in het Esperanto.

Universala Esperanto-Asocio.  
Sciigoj.

Kotizoj por 1951. *La kotizoj por la venonta jaro restos sensangaj kaj sumigos do por la diversaj kategorioj de individuaj membroj :*

M.J. (membro kun jarlibro) : je 35 b.fr.  
M.A. (membro abonanta la revuon « Esperanto » kaj la jarlibron : je 90 b.fr.  
M.S. (membro mone subtenanta UEA-n per duobla kotizo, kompanse ricevanta « Esperanton » kaj jarlibron : je 180 b.fr.  
Patrono (subtenanta per dekobla kotizo, ricevanta « Esperanton kaj jarlibron » : je 900 b.fr.

Por ebligi glatan administradon kaj seninterrompun liveradon de la revuo, ni petas la malnovajn membrojn ĝiri sian kotizon sufiĉe frue (prefere antaŭ la fino de 1950) al la pĉk. 4161.35 de Fr. Couwenberg, Blankenberge. Multaj esperantistoj en nia lando, kiuj ĝis nun moviĝis nur sur loka tereno, certe deziras informiĝi, kaj resti informataj, ankaŭ pri la internacia stato de nia Movado. Abono al la jarlibro kaj la revuo estas por ili la indikita vojo. Ni rekomendas al ili, plejeble baldaŭ havigi sian kotizon per la ĉi-supra pĉk. Per sia membriĝo ili samtempe efike kontribuos al plia florado de Esperanto : kion ni ja ĉiuj deziras.

La revuo. — Responde al pli laŭmoda deziro, UEA decidis eldoni « Esperanton » en pli oportuna formato, tiu de la konata « digest »-tipo. La formato duoniĝos, sed normale la gazeto ampleksos 32 paĝojn. La ĉiam kreskanta nombro da abonantoj samtempe ebligas plibonigi la kvaliton de la revuo laŭ prezentado kaj enhavo, tiel ke ĝi certe plaĉos al pli postulema legantaro.

La jarlibro 1951. — UEA esperas aperigi la jarlibron jam en januaro anstataŭ en la printempo kiel kutime. Tiel la membroj estonte jam en la komenco de la jaro disponos ĉiujn havindajn informojn.

Reklamoj. — La kreskanta eldonkvanto igas la reklamadon en la revuo pli kaj pli valora. La peranto volonte informos la interesatojn pri la tarifo de la reklamoj.

Tutpaĝa reklamo en la jarlibro kostas 600 b.fr. Bonvolu noti, ke ĝia teksto atingu nin antaŭ la 20-a de novembro.

La peranto por F.L.E.

gus pri elpenda stato kaj ne pri certa objekto. Formante sunstantivojn el adjektivoj oni povas forlasi la sufikson -ec, se temas pri abstraktaj nocioj kaj ne pri la kvalito de io aŭ iu, ekz. li estis kaptita de malvarmo, li diris la veron, malbonon oni trovas ĉie, sed : lia boneco estas senlima, mi dubas pri la vereco de liaj asertoj, la malvarmeco de la aero malsanigis lin.

Verbeter de volgende zinnen :  
1. Hieraŭ ni estas renkontinta konatulo de nia taljoro.

2. Li posedas mil da guldenoj pli ol sia frato.

3. Ne studinte longe estas preskaŭ certa, ke vi ne sukcesos.

4. Lia postulo konsternigis min, ĉar kion li postulis montrigis neefektivebla.

5. Li skribis min leteron en kiu li komunikis, ke li ne abonus sin je la nova gazeto.

Vertaal :

Leviĝis sur Romo brila frosta mateno. En la sunlumo disradiis la orumajoj de la feste ornamitaj temploj kaj palacoj. La civitanoj, gaje kaj lukse vestitaj, alsvarmis el siaj domoj. Ĉiuj homaj ondoj alfluas al la amfiteatro de Flavio, nun pli bone konata kun la nomo « Koloseo », kaj ĉiu ero el tiu amaso direktas sin al la arkaĵo, kies numero estas enskribita sur lia bileto. La kolosa konstruaĵo iom post iom ensuĉas la tutan vivantan fluon, kiu dissemiĝas interne kaj vivigas vicon post vico de la ŝtupbenkoj. Fine la tuta interno estas punktita de homaj vizaĝoj kaj la muroj mem ŝajnas moviĝemaj pro la svarmanta homamaso. Post kelkaj horoj tiu estaĵaro, piensatigita de sango, flamiĝa de bruta furiozo, disfandiĝos kaj elfluos per densaj, sinsekvantaj ondoj tra la samaj koridoroj, tra kiuj ĝi eniris.

El « Fabelo » de Wiseman.

Inzenders, die postzegel voor antwoord insluiten, ontvangen hun werk gecorrigeerd en zo nodig van aanteekeningen voorzien terug. Alleen de rechterhelft van het papier beschrijven, a.u.b.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 October aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel ; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.  
 Penningm. : P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.  
 Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.  
 Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

**KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO**

La ĝenerala kasisto petas la sekciajn kasistojn kaj la ĝeneralajn anojn pagi la kotizon por la dua duonjaro 1950. Pagoj prefere per poŝtkonto 34563 de Ned. Esperantisten-Vereniging L.E.E.N., Amsterdam.

*Fine de aŭgusto «La Estonto Estas Nia» ekzistis 45 jarojn. Plenkuraĝe ĝi komencis novan 45-jaran periodon, sed ni esperu ke ĝi ne travivos la finon de tiu periodo pro la simpla fakto ke tiam Esperanto jam estos ĝenerale uzata tiel ke Esperanto-asocioj estos superflua lukso.*

Ni atentigas la anojn je par. 13 de nia statuto laŭ kiu tiuj anoj, kiuj deziras eksliĝi je la jarfino, devas komuniki tion antaŭ la 1-a de novembro al la sekcia sekretario. Ĝeneralaj anoj komuniku tion antaŭ la 1-a de novembro al la ĝen. sekretario.

La kursgvidantojn, kiuj bezonas «Esperanta Krestomatio» por siaj lernantoj, ni atentigas pri tio, ke la provizo baldaŭ estos elĉerpita. Oni do baldaŭ mendu la bezonatan kvanton ĉe la libro-servo. Prezo g. 1,50.

**KONGRESO 1951**

La XVIII-a kongreso de «La Estonto Estas Nia» okazos en 1951 en Hilversum, ne kiel kutime je Pasko, sed je Pentekosto, tre verŝajne en kunlaboro kun «Flandra Ligo Esperantista», kiu aranĝos je Pentekosto sian XVI-an kongreson. Do, verŝajne unufoje vera «Benedux-kongreso»!

De abonné's, die het abonnementsgeld over 1950 ten bedrage van fl. 2,25 nog niet hebben voldaan, worden beleefd verzocht het verschuldigde over te maken op postrekening 34563 van de Ned. Esperantisten-Vereniging L.E.E.N. te Amsterdam.

**PROPAGANDO**

La komitato de U.E.A. decidis dum la Universala Kongreso en Bournemouth, starigi apartan fakon por la tutmonda propagando. Tiu fakon gvidis dum la pasinta laborjaro s-ro Strömne el Malmö. Ĉar li ne plu povas okupi sin pri tiu grava flanko de nia aktiveco, d-ro I. Lapenna transprenis lian taskon kaj komencis sian laboron per elsendo de ĉi-kulero al la landaj asocioj, el kiu ni citas la jenon :

La tula aktiveco de la organizita Esperanto-movado estas dividenda je tri ĉefaj fakoj. La propagando havas la taskon atentigi la publikon pri la ekzisto kaj taŭgeco de la internacia lingvo ; la instruado havigas novajn uzantojn de la lingvo kaj la praktika utiligo signifas la kreon de konvenaj servoj, por ke ĉiu persono, scianta Esperanto, povu eluzi la lingvon. Nur la bona funkciado de la tri branĉoj povas doni vere grandajn rezultojn jam en la proksima estonteco. D-ro Lapenna rekomendas la fondon de apartaj sekcioj aŭ komisionoj pri propagando kaj aranĝon de aparta propaganda semajno, kies celo estas atentigi la publikon pri Esperanto kaj altiri al la novaj kursoj, kiuj komenciĝu tuj post la propaganda semajno, kiom eble plej grandan nombron da lernantoj. Nepre oni evitu vulgaran reklamon per mult-taj flugetoj, malnovaj paligintaj afiŝoj, k.t.p. Se oni aranĝas ekspozicion, prefere oni ekspoziciu malpli da libroj kaj gazetoj ol multe da sensignifaj broŝurotoj kaj folietoj. Oni ne tro emfazu pri la facileco de Esperanto. Same oni evitu la ciferojn pri la nombro de gazetoj, esperantistoj, k.s. ĉar fakte kelkajn el tiuj nombroj neniu konas. Skribante artikolojn kaj farante prelegojn oni parolu nur pri Esperanto kaj nepre evitu mencii la aliajn projektojn de internacia lingvo. Diskutu kun aŭ pri mortnas-kitoj vere ne havas sencon. La kursoj estu klare anoncataj jam dum la Esperanto-semajno sur ĉiuj propagandiloj, uzataj dum tiu tempo. Por instigi la lernantojn al serioza studado oni povus aranĝi konkurson. Ĉiu lernanto devus pagi iun sumeton kaj la plej bona el ili ricevus premion : senpagan partoprenon en iu kongreso aŭ somera aranĝo. La Pariza kongreso klare montris, ke nia movado faris seriozan paŝon antaŭen. Ni daŭrigu laŭ tiu vojo, energie kaj celtrafe!

**PETITIONNEMENT AAN DE VERENIGDE NATIES**

In Lake Succes werd op 2 Augustus j.l. door een delegatie van zes personen een petitionnement van de Esperanto-beweging overhandigd aan de heer Benjamin Cohem, hulp-algemeen-secretaris van de Verenigde Naties.

In dit verzoekschrift wordt aan de V.N. gevraagd, het gebruik van Esperanto op alle mogelijke manieren te helpen verbreiden, b.v. door het onderwijzen van Esperanto aan te moedigen in die scholen, welke over daartoe bekwame onderwijzers beschikken, en het gebruik ervan te bevorderen bij toerisme, internationale handel en correspondentie.

De meer dan 16.000.000 individuele en collectieve handtekeningen, w.o. ruim één miljoen uit Nederland, werden verzameld in vier grote albums plechtig aan de V.N. overgedragen. Tot de individuele ondertekenaars behoren onze Minister-President dr. Drees en de President van de Franse Republiek Auriol, en verder b.v. 40.000 onderwijzers.

Bij deze gelegenheid werd in de zetel van de V.N. voor de eerste maal Esperanto gesproken. De zes vertegenwoordigers spraken n.l. allen behalve in hun landstaal (Engels, Russisch, Spaans en Frans) ook in het Esperanto. De heer Cohen beloofde de Directeur-generaal van de UNESCO, Jaime Torres-Bodet, van de ontvangst in kennis te zullen stellen.

**VERDLANDO VOKAS (VI - 31-VIII-1950).**

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando, Belgujo kaj la cetera okcidenta Eŭropo.

Mallongigoj : I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso.

<b>Ĉiutage :</b>	16.00-16.15 Prago, 31,41 m., 25,34 m. : I. 19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : I kaj P. 22.00-22.30 Prago, 25,34 m. : P.
<b>Dimanĉe :</b>	9.00, 11.00, 13.00 «Nigra Stacio», 47,13 m. : Gram. 17.00-17.20 Romo, 16,9 m., 19,5 m., 25,2 m. : I.
<b>Lunde :</b>	6.30 - 6.35 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 513 m. : I. 8.15 - 8.30 Sveda Radio, 49,46 m., 19,80 m. : I. 16.15-16.30 Sveda Radio, 27,83 m., 19,80 m. : I. 17.30-18.00 Rio de Janeiro, 375 m., 30,71 m. : K. 22.50-23.00 Prago, 470 m., 315 m. : I kaj P.
<b>Marde :</b>	2.15 - 2.30 Sveda Radio, 27,83 m., 19,80 m. : I. 12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Arth. Baur. 18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,46 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
<b>Merkrede :</b>	0.45 - 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I. 18.00-18.20 Lille, 235 m. : P. (Nur ĉiuduamerkrede). 22.50-23.00 Prago, 470 m., 315 m. : P. 23.00-24.00 Prago, 470 m., 315 m. : «La Verda Stacio» dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato).
<b>Ĵaŭde :</b>	12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj mondpaco. 15.30-15.45 Graz (Alpland), 240 m. : K. de prof. Hainschegg. (Nur la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato). 18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,36 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
<b>Vendrede :</b>	9.05 - 9.20 Parizo, 48,39 m., 347 m. : K. 16.40-16.55 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 203 m. : I. (Nur ĉiuduavendrede). 17.00-17.20 Romo, 16,9 m., 19,5 m., 25,2 m. : I. 17.45-18.00 Hilversumo II, N.C.R.V., 298 m. : P. (Nur unufoje en du monatoj).
<b>Sabate :</b>	23.15-23.20 Hilversumo II, K.R.O., 298 m. : I.

Informoj kaj petoj :  
 Bonvolu eltranci ĉi-supran liston kaj glui ĝin sur fortikan paperon, kiun vi metu apud vian radio-aparaton. Por gajni tempon kaj spacon ni poste indikos nur la ŝanĝojn kaj aldonojn.

Radio Prago. — La ondo 31,41 m. estas trioble pli forta ol tiu de 25,34 m. Estas bezonata pli vasta apogo flanke de la aŭskultantaro en formo de alskriboj. La ĉiutagaj elsendoj kaj la hundaj merkredaj estas administre apartigitaj de la «Verda Stacio». Pro tio oni skribu ne sur unu papero samtempe al ambaŭ elsendoj. Adresu : 1 : Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-sekcio, Stalinova 12, Praha XII. 2 : «Verda Stacio», Ĉeĥoslovaka Radio, Literatura Sekcio, Stalinova 12, Praha XII.

Parizo ankoraŭ silentas en Esperanto!! — Ĉu vi jam sendis petskribon al Franca Radio, Esperanto-jako, Parizo, pri reokazigo de la Esperanto-elsendoj? Se ne, b.v. skribi! Se jes, bonvolu reskribi!

Agrablan aŭskultadon deziras al vi ĉiuj S. S. de Jong Dzn., Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, TIERKWERD (Frislando), Nederlando, al kiu oni sendu ĉiujn informojn pri radio-elsendoj.

**Flandra Ligo Esperantista**

Post libertempaj ĝojoj kaj ripozo, la ligo laborperiodo jam komenciĝis antaŭ la apero de ĉi tiu n-ro F.E. La estraro, kunsidis la 17-an de la pasinta monato en Gent, kaj la tagordo estis tre ŝargita. Ni i.a. priparolis la 16-an kongreson, la varbadon, la «amikojn de F.L.E.» kaj la revuon. En kelkaj vortoj mi volas resumi la konkludojn de la estraro rilate tiujn gravajn punktojn.

**1. La 16-an kongreso :**

La 7-a paragrafo de la kontrakto subskribita la 26.9.48 kun la Nederlanda Esperanto Asocio LEEN tekstas jene : *Er zal een innige samenwerking betracht worden bij het organiseren van en de deelname aan Congressen, Zomercursussen, enz...*

Post du jaroj ni konstatas ke ĉiam pli da nederlandanoj venas suden, kiam la flandroj vojaĝas malmultnombrenorden, kvankam ankaŭ la nombro de la unuaj ne estas granda. Laŭ ni, la nura solvo estas : kunlaboro organizi la du ligajn kongresojn en unu sama loko, foje en Nederlando, foje ĉe ni. Kaj la momento ŝajnas des pli oportuna ke oni povas esperi ke la landlimaj baroj iom post iom kaj rapide malaperos! Ni do petis al LEEN ke ĝi prenu la respondecon pri komuna kongreso (en la urbo Hilversum). Ni jam eksciis la principan akcepton kaj tuj du gravaj problemoj estis solvitaj : LEEN portos ĉiujn financajn zorgojn kaj fiksis la daton de la kongreso je Pentekosto. Aliflanke ni zorgu por multopa nia ĉeesto (per aŭtobusa kaj vagonara karavano!) kaj pri la varia vespere. La estraro indikis la kompetentulojn por tiu organizado kaj por la daŭra kontakto kun la kongresa komitato!

Nu, jes, vi opinios, sed la statuto kaj la artikoloj 15 ĝis 18 de la organiza regularo? La estraro estas ja rajtigita en urĝaj okazoj decidi ĝis la posta jarkunsido (en novembro); tiam la estraro faros proponon pri paragrafo, valida nur por unu jaro, kiu anstataŭos la aluditajn artikolojn de la O.R. Karaj ĝeamikoj, preparu vin, aliĝu al la 16-a Kongreso de F.L.E. en Hilversum!

**2. La varbado :**

Ĉi-jare ni ne donos premiojn por la varbado de membroj : vi ja ni zorgu ke la varbado ne stagnos kaj ke la propagando poresperanta fariĝos ade pli efika. Ni ripetu la kotizojn (ni proponos la

samajn al la jarkunsido) :  
 Junul(in)o ĝis 18 j. : 50 Fr. (F.E. kaj Juna Vivo)  
 Junul(in)o ĝis 21 j. : 50 Fr. (nur F.E.)  
 Membro : 75 Fr.  
 Familia membro : 25 Fr. (nur «De Esperantist»)

Subtenanta membro: minimume: 150 Fr.  
 Ni urĝe petas ke la sekcioj kaj izolaj membroj jam tuj komencu la varbadon kaj sendu la monon al la ligo kasisto, kiu nepre bezonas jam nun prepari sian venontjaraĵon buĝeton!

**3. «Amikoj» :**

Ni funde pristudis la eblojn por pli bone organizi tiun membro-kategorion. Ĝis nun la kotizo estis tre malalta; kaj post subtraho de la sekcia parto ne restis al la Ligo io sufiĉa por realigi ion ajn. Cetere, la «amiko» ŝatas ricevi ion, kio atestas pri lia ligiteco al la Ligo kaj ekscii ion pli pri la simpatiata Esperanto. Tiumtempe ni solvis la problemon kreante duan kotizon de 25 Fr. (anst. 15 Fr.) kaj sendante al tiu kategorio «De Esperantist».

Krome, se la unuajn jarojn la amiko-varbado ĉefe estis financa subteno, montrigis ke pli bona organizado necesas, por kapti personojn, plej ofte intelektulojn, kiuj interesigas pri la Movado, kvankam komence ne volante lerni la lingvon. En tiu senco la informa kunveno, organizita la 24-an de sept. en Brugge nur por «amikoj» aŭ simpatiantoj estas pionira laboro. Pri la kunveno mem la sekcioj kaj reprezentantoj ricevos cirkuleron.

Konsiderante tiujn diversajn aspektojn de la problemo, la estraro fiksis la kotizon je 20 Fr. Estos do nur unu amiko-kategorio, sed ĉiu amiko de nun ricevos «De Esperantist», estos pli ligita al la Movado kaj Esperanto ĝenerale; krome disponante pri la adresoj ni povos sendi de tempo al tempo propagandadojn. En kazo de sukceso, ni provos plioftigi kaj ĝeneraligi la supre diritajn informkunvenojn.

Tiamaniere, espereble, niaj ligoj pli vaste kaj pli efike varbados, ĉar io estos ja ĉiukaze sendata al la varbitoj. Notu ke la varbado okazos sen amiko-kartoj : vi sendu la 20 Fr. al la Ligo Kasisto (eventuale pere de la sekcio) kaj tiu prizorgos la dissendadon de «De Esperantist».

Sur tiu tereno, ni nepre devus akiri sukceson : tiam ni rajtus peti al la redakcio «De Esperantist», ke ĝi enpresu informojn kaj artikolojn fare de kaj por la Amikoj de F.L.E.

**4. Revuo :**

Okaze de la Kongresa ĝenerala kunsido ni firme promesis plialtigi la paĝonombro de nia organo dum 1951. Ni aldonu ke konsiderante la plialtigon de la paperprezo, ni ne povos tute realigi nian intencion. Ni ja malgraŭ ĉio kapablas tion se por 1951 niaj anoj eksterordinare — kiel decas al Esperantistoj! — streĉus la fortojn kaj akirus mirigajn — kvankam ne miraklajn — rezultatojn en la varbado. Ĉu ni ne certu ke tion realigu vi?

Via sekretario,  
 M.G.

**FERIAJ KURSOJ EN HELSINGÖR**

La ĉi-jarajn feriajn kursojn en Helsingör (Danlando) ĉeestis proks. 130 personoj el 8 landoj. Krom la daŭriga, perfektega kaj konversacia kurso okazis ĉi-jare ankaŭ speciala kurso por infanoj, kiun gvidis f-ino Inge Mortensen el Fredericia. La aliajn kursojn gvidis f-inoj Noll kaj Christensen (ambaŭ el Kopenhago), s-roj de Goeij (el Rotterdam) kaj Morariu (el Stockholm). La humoro dum la kurssemajno estis bonega kaj la kursanoj sentis sin unu granda rondo familia.

Jam kelkajn jarojn ni aranĝas ankaŭ aŭtunajn kursojn en la Sporta Altlernejo de Vejle, belega loko ĉe maro kaj arbaroj en tipe dana regiono. Ĉi-jare ili okazos 15-22 de oktobro. Ni invitas ankaŭ vin partopreni. Vi neniam forgesos la restadon inter diverslandaj gesamideanoj! Petu senpagan programon de L. Friis Ingemannsvej 9 Aabyhøj, Danlando.

**RESANIĜO PER ESPERANTO**

Ĉeĥa samideano, kiu havis tuberkulozon kaj povis esti savata nur per nova medikamento, kiun oni en Ĉeĥoslovakujo ne povas akiri, petis pere de lokaj samideanoj la helpon de la nederlandaj gepartoprenintoj en la aŭtobuskaravano, kiu la antaŭan jaron vizitis Ĉeĥoslovakujon. La nederlandaj gesamideanoj aranĝis monkollektion kaj baldaŭ f-ino Stienstra el Heerenveen nome de la eks-karavananoj povis sendi la bezonatan kvanton de la nova kuracilo al Ĉeĥoslovakujo. La pacientino dank' al tiu helpo estas nun preskaŭ resaniĝinta kaj baldaŭ povos forlasi la malsanulejon.

